

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerc“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
L. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 193
25. 5. 1924

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo
po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto
suferta maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,06 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo
po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,30 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.),
en „Internacia Komerc“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Granda perspektivo por Esperanto en Turkujo

Esperanto deviga fako ĉe Rumana Polico kun ŝtata salajrata instruisto.

Deviga Esp. klaso en Montezuma Lernejo en Los Gatos (Kalifornio).

Esperanto en Turkujo.

Mi vizitis Konstantinoplon kun pluraj rumanaĵ skoltroj kaj mi uzis la okazon por orientiĝi pri la nuna stato de Esperanto en tiu grava mondurbo. Okaze de la ŝanĝigo de l' registaro, la iam vigle propagandintaj grekaj samideanoj foriris, sed nun fervore eklaboris s-o D-o Ali Fouad Bej, hon. ĝenerala inspektoro saneca, kiu ĝis la nunjara marto pro troa okupiteco en aktiva servo ne povis dediĉi sufiĉan tempon al Esperanto.

Sinjoro D-o Ali Fouad bonvole prezentis min al s-o Safvet Bej, direktoro de l' Publ. Instruado en Konstantinoplo, vasthorizonta pedagogo, kiu post interesa diskuto promesis, ke li donos plenan moralan kaj teknikan helpon al s-o D-o A. Fouad Bej, Prof. de Esp., ke Esperanto estu oficiale enkondukata en la konstantinoplaj lernejoj komence de la nova lerneja jaro, en septembro 1924.

Raportinte pri la ekzisto de Skolta Esperantista Ligo kaj ĝia praktikeco al s-o Samy Bej, inspektoro de Fizika Edukado en Konstantinoplo kaj komandanto de Turka Skoltaro, s-o komandanto prezentis pelon al s-o D-o A. Fouad por gvido de speciala esp. kurso por la turkaj skoltroj.

Vizitinte la turkan Polican Lernejon en Skutari, mi estis surprizita de ĝia moderna, perfekta aranĝo. La direktoro kun intereso aŭdis la detalojn pri la enkonduko de Esperanto ĉe la rumana polico. Ĉe la Universitato kaj Instruista Preparaĵo en Konstantinoplo kaj ĉe la Medicina Fakultato en Heiderpaŝa mi sukcesis interesiĝi pri la mondlingvo kelkajn profesorojn kaj studentojn. Amikoj de Esperanto fariĝis ankaŭ s-o G. I. Ionesco, ĝen. konsulo kaj s-o O. Beu, legacia sekretario de Rumanujo en Konstantinoplo.

Pere de s-o D-o A. Fouad Bej estis eble al mi interrilati kun pluraj gravaj personoj de la turka socia vivo kaj mi estas konvinkita, ke nia komuna semo baldaŭ ekgermos sub la konscia zorgado de nia eminenta turka samideano.

T. Morariu, sekr. de Esp. Centro Rum.

Esperanto devige instruata ĉe la Rumana Polico. La unua instruisto ŝtate salajrata.

Antaŭ kelkaj semajnoj ni raportis pri la sukceso de la eksperimenta kurso farita ĉe la Bukaresta Policoficira Lernejo, laŭ la ordo de s-o Romulus Voinescu, ĝenerala direktoro de Rumana Polico kaj Ŝtata Sekureco.

Hodiaŭ ni plezure komunikas, ke la Rumana Ministerio por la Internaj Aferoj eldonis la dekreton, kiu enkondukas Esperanton kiel devigan objekton ĉe tiu lernejo kaj nomas s-on Tiberio Morariu, sekretario de Esp.-Centro Rumana, kiel ŝtate salajratan instruiston por tiu instruado.

Tiuj ĉi faktaj havas eksterordinaran gravecon ne nur teoriaran, sed ankaŭ praktikan, ĉar en Rumanujo povas fariĝi polica oficiro nur tiu, kiu absolvis la kursojn de tiu lernejo.

Tiel grava oficiala alproko kaj enkonduko de nia lingvo estas ĝis nun unika kaj ankaŭ la apliko de speciala instruisto ŝtate pagata por la ordinara instruista salajro estas unua fakto tia en la historio de nia movado.

Jen la teksto de la dekreto:

Reglando Rumanujo
Ministerio de Internaj Aferoj
N-o 19258 de la 25 marto 1924.

Decido.

Ni, ŝtata subsekretario ĉe la Interna departemento, Pri la referato de sinjoro Ĝenerala Direktoro de la Polico kaj Ŝtata Sekureco, Direktoro de la Polica Lernejo, decidis:

Art. 4. — Estas aprobita la enkonduko de l' higienia kaj polico-saneca kurso kaj tiu de la kurso de lingvo Esperanto, kaj ni nomas de la tago de 1 aprilo sinjoron

D-on I. Bomchis kiel profesoron de higieno kaj sinjoron Tiberio Morariu kiel prof. de la lingvo Esperanto, fiksante por ili honoraron de 1500.— leoj, monate, pagotajn konforme al la art. 87. de la Ministeria budĝeto.

La ŝtata subsekretario: subs. Franasoviĉi.

XIII-a Belga Esperanto-Kongreso.

Brugge-Bruges, 7—9 junio 1924.

Ni havas la honoron sciigi ke la estonta XIII-a Belga Esperanto-Kongreso okazos en Brugge-Bruges, la 7—9 junio venonta (Pentekosto). Jen la Programo.

Sabato, 7 junio

En la salonegoj de «Vieux Bruges», 1-a etaĝo, Stonostrato, 75.

18 — h. Akcepto de la kongresanoj.
20 — h. Parolado de s-o Jean Desonay. Temo: Spa (kun lumbildo).
20 — h. Kunveno de la Ligestraro (en aparta ĉambro).

Dimanĉo, 8 junio.

8,30 h. Kunveno, Burga placo, por viziti la «Muron de la Mortpafitoj» kie krono estos metata.

10 — h. Oficiala akcepto de la kongresanoj en la gotika Ĉambrego de la Urbdomo.

10,50 h. Ĝenerala kunvido de Belga Ligo Esperantista en la koncerta Salonego, Sankta Jakobstrato, 36.

13,50 h. Festeno en «Hôtel du Cornet d'or», Simon Stévin placo, 2

16,30 h. Fotografado en Parko «Alfred Ronse» Ĝardeno de Gruuthuse.

17,50 h. Promenado sur la internaj kanaloj; enboatigo: nova strato, 11.

18 — 19 — h. Sonorilara koncerto. S-o Nauwelaerts ludos «La Espero» ktp.

20 — h. Brila vesperfero en la Festhalo de «Hôtel Halle de Paris» arĝenta strateto, 5 Orkestro.

22 — h. Bal, en sama ejo. Orkestro kaj malvarma bufedo.

Lundo, 9 junio.

8,30 h. Kunveno je la stacio de la vaportramveturilo de Knocke, nova promenejo.

8,51 h. Preciza foriro de la tramveturilo al la Haveno interna de la urbo.

9,15 h. Enŝipiĝo en la «Pieter de Coninck» kaj navigado sur la Markanalo.

10,15 h. Alveno al Zeebrugge, vizito de la Muzeo. Moleo kaj «Ferry Boats».

12,15 h. Promenado al Knocke-Zoute per rezervita tramveturilo, laŭlonge la marbordon.

13 — h. Lunĉo en Zoute. Diversaj amuzoj. Disiĝo.

Senperaj vagonaroj de Knocke al Bruĝo, Gento kaj Bruselo.

Por ĉiuj informoj oni sin turnu al:

XIII-a Belga Esperanto-Kongreso,

4, Wijnzakstraat, rue de l'outr, Brugge-Bruges, Poŝtekkonto 129,805.

Programo

por la jarkunveno de «Centra Dana Esperantista Ligo» en Aarhus dum pentekosto 1924.

Kunvenejo: «Palæ», Skolebakken.

Dimanĉo, la 8 junio:

8 h. matene Salutkunveno.
10: Ŝipveturado al «Ornereden».
11—12 h. Matemango en la arbaro.
1 h. Promenado al «Varna». (Fotografado.)
4 h. Komuna kafotrinkado en la restoracio de «Varna».
5 h. Veturado al la kunvenejo.
6 h. Komuna mangado.

Lundo, la 9 junio:

9—10 h.: Ĝeneralkunveno de «C. D. E. L.»
10—12 h.: Labora kunveno.

12—5 h: Paŭzo por tagmango kaj por eventuala vizito en la malnova urbesra domo en la botanika ĝardeno.

5 h: Ekkurso al la banhotelo de Risskov.

4 h: Komuna kafotrinkado.

6 h: Reveno al Aarhus.

8 h: Adiaŭa kunveno en «Palæ».

Kongreskartoj kostas 5/2 danajn kronojn kaj valoras por partopreno en la kunvenoj kaj por regalado dum la adiaŭa festeto. Plue ricevos ĉiu partoprenanto belan ilustritan gvidlibron pri Aarhus, presitan sur luksa papero. — Pri aliĝo oni sin turnu antaŭ la 5a de junio al s-o M. Palsberg, Langelandsgade 4, aŭ al s-o C. A. Hvorslev, ambaŭ en Aarhus, aŭ al s-o M. Blicher, Bredgade 65, Kopenhago K.

IV. Kongreso de Franclingva Laborista Esperantista Federacio (F. E. O.) dum pentekosto 7.—9. 6.

La 7, 8, kaj 9 ain de junio (Pentekosto) okazos la IV-a kongreso de la Franclingvana Laborista Esperantista Federacio (F. E. O.) en la «Popoldomo» de Rouen, 16 rue Damiette.

Tagordo: Sabato 7. 6. je la 20. 30 h. Propaganda kunveno.

Dimanĉo 8. 6. 9.30 h. Unua kaj dua (14h.) laborkunvidoj: raportoj de la sekretario, kasisto, redaktisto, librejstero, kurso per korespondado, presa informservo.

Lundo 9. 6. 9.30 h. Tria laborkunvido; diversaj demandoj. Posttagmezon, je la 14 h. vizito de la «muzeurbo».

Pli detalaj klarigoj aperos en «L'Antinationaliste» No 6, 177, rue de Bagnolet, Paris XX-a, 0,25 franca franko po ekzemplero.

Eksterlandaj kamaradoj estos kore akceptataj. Por pagi la elspezojn de la kongreskaso, poŝtkartoj de Rouen estas haveblaj ĉe la Rouen'a grupo po dekduo sv. fk. 0,35 afrankite (1 franca franko)

Oni sin turnu koncerne ĉio por la kongreso al s-o E. Cuillerdier, 15a, rue Brémontier, Rouen. (Nacilingvaj laboristaj gazetoj represu tiun ĉi inviton)

VI-a Hungarlanda Kongreso Esperantista en Szombathely, Pentekosto 8—9 junio 1924.

Szombathely invitas la geesperantistojn dum la pentekostaj festitagoj partopreni kongreson hungarlandan. En tiu ĉi urbo kolektiĝos nunjare la entuziasmaj hungarlandaj kaj la proksimaj eksterlandaj geesperantistoj dokumenti la progreson kaj disvastigon de nia lingvo Esperanto.

Provizora programo:

Sabate, 7 junio: alveno, posttagmeze malfermo de la ekspozicio, vespere interkonatiĝa vespero.

Dimanĉo, 8 junio: diversaj diservoj, solena malfermo de la kongreso, la of. laborkunvido, propagandparolado, komuna tagmango, posttagmeze fotografado, fakkunvidoj, vespere kabared-vespero, poste danco.

Lunde, 9-a de junio: 11a of. laborkunvido, fakkunvido, fermo, posttagmeze ekkurso al Kőszeg, vespere forvojaĝo. Por tiuj, kiuj restas marte ankaŭ en Szombathely, la L. K. K. aranĝos promenadojn kaj ekskursojn por viziti la vidi nd aĵojn de Szombathely.

Aliĝo: La kongreskotizo estas 5 svisaj frankoj: Aliĝilojn peti de Loka Kongresa Komitato (Szombathely, Paragardi utca 18.) La aliĝo valoras nur tiam, se la kongreskotizo jam alvenis. El sama familio nur unu kongresano pagas la tutan kotizon, la pliaj familianoj pagas po persono la duonon. Por la blinduloj la aliĝo estas senpaga.

Loĝejo: Por la aliĝintaj kongresanoj la L. K. K. klopodas akiri laŭ deziro komfortajn loĝejojn. La tre est. partoprenontoj estas parataj sendi la aliĝilojn kiel eble plej baldaŭ. Adreso: L. K. K. Szombathely, Paragvári u. 18.

Detaloj sekvos.

Loka Kongresa Komitato:
D-o Gézo Halmágyi, def. de U E A.
Esperantaj gazetoj estas petataj publikigi tiun ĉi inviton.

XI. Kongreso de K. E. F. en Vich dum Pentekosto 8.—10. junio 1924.

La 8.—10. de la venonta junio okazos en nia malgranda urbo Vich la ĉiujara Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio.

La plena sukceso de la antaŭaj dek kongresoj kiujn tiel bele aranĝis K. E. F. en diversaj urboj de nia esperantema lando estas la plej bona garantio por ke la XIa ne malprosperos. Kontraŭe, la entuziasmo, per kiu oni estas aranĝanta la festojn, ekskursojn, Internaciajn Florajn Ludojn, ktp., por fari pli agrablajn, dum la tri kongresotagoj, la ĉeestadon de la esperantista gento en nia urbo, esperigas ankoraŭ, ke tiu ĉi superos la aliajn.

Bone scias ĉiuj, kiuj partoprenis en esp. kongreso, la vivigan povon de tiuj pacaĵoj kunveno. Dum la plejmultaj el la publikaj festoj postlasas spiriton disigantan kaj lacigantan la korpon, la niaj idealigas kaj plifortigas. Lasu tiujn, kiuj sub flago de falsa pacemo kunvenas nur por akriĝi siajn ungojn, celante la najbaran vizagon; ni veraj pacaĵoj soldatoj nur esperas alporti ŝtonejon al la domo de la homa kunfrateco kaj verŝi balzaman guton sur la homaran vundon mal-feliĉe ankoraŭ sangfluan.

La Organiza Komitato korege sin turnas al la federacianoj kaj al ĉiuj samideanoj, speciale al niaj fratroj hispanaj esperantistoj, invitante ilin ĉeesti nian Dekunuan.

Gesperantistoj! Bonvolu lasti momente vian ĉiutagan taskon, kiu tiel sulkigas vian frunton, kaj venu al ni. Ĉi tie vi trovos nian ebenan beligitan per ĝiaj printempaj juveloj, meze kuŝantan urbeton vestitan per ĝiaj ornamatoj de granda festo, kies loĝantoj vivigas la plej afablan mienon por vin akcepti; plie, centoj da entuziasmaj koroj, kiuj batas laŭ la sama faktio. Kion vi deziras plu? Ne hezitu do, subskribu la Aliĝilon kaj venu al Vich!

Vich (Barcelono), aprilo 1924. La Komitato.

12. Germana Esperanto Kongreso en Plauen. Generala Programo.

Sabato, 7. 6. 24, vespere 8 h: Interkonatiga vespero.

Dimanĉo, 8. 6. 24, matene 8.30 h: Kunsido de la konsilantaro de Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.) (Interna kunsido).

matene 8—10 h: Fakkunsidoj.
" 10.30 h: Solena oficiala kongresmalfermo. tagmeze 1 h: Komunatagmanĝo (ne festbankedo) posttagmeze 3 h: la Generala laborkunsido de Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.) vespere 8 h: „Vespero en Esperantujo“.

Lundo, 9. 6. 24, antaŭtagmeze: Fakkunsidoj. Ekskurso al „Vogtlanda Svisujo“ (por tiuj, kiuj ne partoprenas iun fakkunsidon).
posttagm. 2 h: la Generala laborkunsido de G. E. A. (= ferma kunsido).
posttagmeze: Ekskursoj.

vespere 8 h: „Gaja vespero“ kun balo.

Mardo, 10. 6. 24, antaŭtagmeze: Fakkunsidoj malgrandaj.

antaŭtagmeze: Ekskursoj malgrandaj kaj vizito al la ŝtata artilerujo por teksindustrio (Bahnhofstr.)
tagmeze 12.35 h: forveturo (supra stacidomo) por ekskurso al Bad Elster laŭ detala programo

Fakkunsidoj.

Dimanĉo, 8. 6. 24, matene 8—10 h en Centralhalle:

Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.) matene 8—10 h. en „Tunnel“:

Asocio de saksaĵ instruistoj esperantistaj.

Lundo, 9. 6. 24., matene 8—10 h. en Centralhalle: Germana Scienca Esperanto-Asocio.

matene 9—12 en „Tunnel“:

Internacia ligo de esperantistaj poŝtoficistoj, matene 9—12 en Centralhalle: esperantista junularo.

Mardo, 10. 6. 24., matene 8—9 h. Germanaj Katolikoj.

Krome okazos labor-kunsido por korpo-kulturo kun parolado de s-o W. Reinhard, Glashütte (Sa.) pri Travivaĵoj en la servo de korpo-kulturo.

Pluajn eventualajn fakkunsidojn ni ne jam povas oficiale publikigi, aŭ pro manko de gvidonto aŭ pro ne sufiĉe granda nombro da partoprenontoj. Tiurilatajn informojn donos la „Informejo“ (Centralhalle, teretaĝo).

Ekspursoj.

Precizajn planojn oni trovas en la kongresejo. Tiu, kiu intencas fari lundon, la 9 junio, tutagan ekskursojn en malgranda grupo, anoncu tion tuj en la „Informejo“.

Muziko-Vokala Vespero en Riga.

Sub gvidado de senlaca samideano Henriko Čaĉe, blindulinstruisto, okazis en Riga kurso de 17. 11. pasintjara ĝis 25. aprilo nunjara. La rezultato estis tre kontentiga. Dektri kursanoj submetis sin sukcese al aparta ekzameno.

La 26. 4. oni aranĝis specialan festvesperon por kunigi la kursanojn. Mallongan antaŭparolon faris s-o P. Horomanskij. Parolis plue s-o Krastin, unu el la plej malnovaj esp-istoj en Latvio. La koncertan parton malfermis la horo de la blinduloj-esperantistoj de Latvia Blindul-instituto per „La Espero“. Terceto de blinduloj prezentis specialajn muzikaĵojn. Krome partoprenis blorokestro de blinduloj. Ĉeestis entute proksimume 100 personoj. Ni montras sur paĝo 2 bildon de la kursanoj. En la mezo oni vidas s-on Čaĉe.



Kursanoj de Esperanto-kurso okazinta de la 17.11.23—25.4.24 ĉe Riga Esp.-Societo sub la gvidado de instruisto Inte Čaĉe.

Asocio de germanaj instruistoj esperantistaj.

Dum la kunveno de la delegitoj de la ĝenerala germana instruisto-asocio en Breslau okazos ekspozicio de verkoj de germanaj instruistoj kun la bildo de la aŭtoro. Verkintoj de lernolibroj por Esp. sendu ĝin al kolego Otto Mayer, Breslau 10, Lehndamm 68. Tiamaniere la kolegoj propagandos sian verkon kaj Esperanton.

A. Sohrmann, Weinböhl, prez.

IV-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda

Bruxelles 14—18 aŭgusto 1924.

Komuniko.

Kongresadreso: K-do Baesteels G., — 19 rue de Sébastopol, Anderlecht-Bruxelles.

Kongresejo: Popoldomo, — str. Jos. Stevens, Bruxelles.

Kongreskotizo: Nederlando, Britujo, Usono, Hispanujo, Finnio, Japanujo, Svisujo, Norvegiujo, Svedujo, Danujo pagos 1 dolaron aŭ egalan sumon en nacia mono.

Belgiujo, Francujo, Italujo, Ĉeĥoslovakio, Portugalujo pagos 1/2 dolaron aŭ egalan sumon en nacia mono.

Germanujo, Polujo, Aŭstrio, Rusujo, Hungarujo, Rumanujo, Bulgarujo, Estonio, Jugoslavio pagos 1/4 dolaron.

Aliĝo: valoraj estas nur la aliĝiloj akompanataj de la kotizo. Oni tekstus legeble sian aliĝilojn laŭ jena ordo: familia nomo, nometo, aĝo, profesio, strato kaj n-o, urbo, lando, S.A.T. matrikulo. Aliĝilo, kotizo kaj ĉio prikongresa estu adresata al K-do Baesteels G., 19 rue de Sébastopol, Anderlecht-Bruxelles (Belgiujo).

Pri kongres-programo, tezoj kaj proponoj debatotaj, eldonajoj, ekspozicio, propagand-manifestadoj, publika demonstracio, festo ktp. legu la plenan komunikon en Sennacieca Revuo (petu specimenon) de Sennacieca Asocio Tutmonda, 25 rue Boyer, Paris XX.

Deksesa en Wien.

Korekto.

Fakaj konferencoj.

Farmacistoj: anstataŭ s-o Josef Wagner emetu la adreson s-o M. Telschik, mag. farm., Graz, Mohrenapotheke, Mauerplatz.

Aldonu afable:

Esperantista Literatura Asocio: f-lino Johanna Zschepank, Dresden 19, Paul Gerhardstrasse 22. L. K. K. Wien, Schade

Kvina Kongreso de G. L. E. A. en Chemnitz.

Dum pasko okazis en Chemnitz la Kvina Kongreso de la „Laborista Esperantista Asocio por la germana lingvo-teritorio.“ Felice oni povas raportu, ke la kongreso estis unika sukceso. La laborprogramo estis tre ampleksa. Speciala ekspozicio interesigis la publikon. Antaŭ la oficiala peregramo okazis preparado de la delegitoj. Poste publika salutaranĝo kun muzikaj prezen-

tadoj. Speciale menciinda estas la miksitaj koruso de la laborista kant-asocio „Fulgura“, kiu kantis ankaŭ en Esperanto. Esperanto-kvarteto kaj prezentado de parta sceno el „Faust“ plibeligis la aranĝon.

En la unua laborkunsido okazis la raportoj de la estraro, de la librovendejo kaj de redaktoro de la oficiala organo. Speciale ĝoinda estas la sciligita fakto, ke la membraro de la asocio de post 1922 kvarobligis.

85 grupoj kun 131 delegitoj reprezentis la tutan organizaĵon, krome ĉeestis multaj gastoj.

S-o Roth-Frankfurt faris publikan propagandoparoladon. Paskodimanĉon s-o Hirsch el Waldenburg referis pri propagando. Posttagmeze oni daŭrigis la laborkunsidon, kvankam estis fiksita speciala ekskurso. Tio pruvus, kiom da laboro devis esti farita kaj kiom grava juĝis la samideanoj la laboron, preferante ĝin al ekskursoj. Aliaj samideanoj povas lerni el tio! En rezolucio oni rekomendis al ĉiuj kongresanoj aliĝi al SaT. Okazis kunveno de SaT-membroj kaj de komunistoj-esperantistoj. La estraron prenis sur sin samideano el Leipzig. La proksima kongreso okazos post 2 jaroj en Stuttgart. Detalan raporton enhavos la oficiala organo.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scilgoin (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unu flanko skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj scilgiloj) pri ĉiunovoale el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legende (precipe nomo).

Landoj.

Atentuo!

Ni de nun nur povas akcepti resumajn notojn por la kroniko. Ni do petas ĉiujn sendantojn ilasi ĉion superflu. Raporto, kiuj ne konformigas al la redakcia bezono aŭ ne estos enpresataj aŭ mallongigitaj laŭ neceso. Ankaŭ por „Alvokoj“ ni povas de nun nur akcepti mallongajn notojn. Sparus al la redakcio necesece perdoni de tempo, kiun ĝi povos uiliĝi por multe pli gravaj laboroj.

Ameriko.

Usono.

San Francisco. Du klasoj, unu instruata de Kapitano Posnikov, ius ekzamenis kaj donis ateston pri lernado al sep gestojn kaj nun instruas alian klason en oficejo de Delegito Ames.

Alia klaso gvidata de s-o Rivers ĉe „La Vero Foundation“, kie oni havis ĉiulunde paroladon en Esperanto de tiu bonkonata esperantisto. Perolis dum monato aprilo s-o Delegito Ames kaj Inĝeniero Rosner. Jurnalito estas favorata.

Deviga Esp. Klaso en Montezuma lernejo.

Los Gatos, Calif. Du klasoj, unu de Tenzella Societo kun kvin studentoj kaj alie ĉe Montezuma Lernejo por knaboj, kie dekdok studentoj kaj du instruistoj lernas la lingvon. Kiam komencos nova lernjaro, la lernado estos deviga. Profesoro de lingvoj nun konstatas, ke Esperanto helpas en la lernado de latinaj lingvoj. Instruanto estas Delegito E. A. Rogers, lernejestro.

Oakland, Calif. Jurnalito tre favoraj. Oni penas aranĝi kun Radio-Stacio dissendi lecionojn en Esperanto, kiel oni sukcesas instrui hispanan lingvon.

Tacoma (Washington). Reorganizo de „Verda Sieto“, kiu kunvenas ĉe 1109 1/2 A Str. Gvidanto estas iama Delegito John W. Wood.

Eŭropo.

Belgiujo.

Antwerpen. Flandra Grupo Esperantista. Ĉiu esperantisto, deziranta informojn aŭ broŝurojn pri la flandra movado, petu ĝin al la sekretariino de la suprenomita grupo: f-lino Maria Vervloet, Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen, Belgiujo.

Ĉeĥoslovakio.

Lučenec-Lozsonz. La komencia aŭtunkura inter la kamaradoj soldatiga estas finita je la fino de la marto de s-o Rosner, apogita de s-o Mareček. Dum la somero oni renkontigos nur ĉiusemajne por la progresado. Soldatiga Rondo Esperanta fondiĝos. Por la korespondado kun lernantoj oni turnu sin al s-o Roberto Rozner, Cs. p. pl. 25 pr. 3. po. ro., Lučenec.

Praha. F-lino J. Šupichová paroladis en grupoj kaj antaŭ neesperantista publiko en jenaj societoj: 8. 9. „La 15.“ (Unuigo de junaj lernantinoj), 15. 9. „La 15. (Rondeto de esp-inoj)“, 1. 10. „Kiel Esperanto servas al homaro“ (Rondeto de esp-inoj), 25. 10. „Cu Esperanto estas neceso“ (Katolika Unuigo), 27. 10. „Esperanto kaj nia nacia lingvo“ (Solena vespero de Esp. rondeto), 15. 11. „Esperanto kaj ĝia signifo por nia junularo“ (Lerneja konferenco de la gepatroj), 5. 12. „Capitol“ el historio de arifariata lingvo (Unuigo de instruistoj), 27. 2. „La problemoj de internacia lingvo“ (Edukista kaj humana unuigo) 6. 4. „Comenius kaj arifariata lingvo“ (Rondeto de esperantistoj).

Olomouc. La regiona kvaronjara kunveno de nordmoraviaj esperantistoj okazis la 6. 4. en Olomouc Y.M.C.A. Malfermis la laboran kunsidon s-o Kudela. Rezerentanto estis nur la urbo Bystřice p. H. Odřičec, Přerov kaj Prostějov, kiuj elsendis delegitojn, kvankam multaj estis invititoj. Poste prezidis la sama la kunsidon kaj protokolis s-o Hochmaier. La prezidanto legis leteron de s-o Sklenář, ĉefdel. de UEA, kiu rememorigas kaj rekomendas 2 gravajn punktojn, ke ĉiu samideano farigu UEA-an kaj ke en ĉiu urbo estu delegito.

Poste raportis la delegitoj pri la agado en siaj lokoj. Poste okazis propagando-parolado je la 2 h. posttagmeze komencis la amuza parlo. Poste parolado pri Konstantinopolo de s-o Kudela.

Franclujo.

Orléans. La grupo ricevis de la urba konsilantaro subvencio de 200 fr. En la sama urbo parolado farita antaŭ la sekcio de la Ligo de Homoj kaj Civitanaj Ranoj de s-o Roux. En la Polro la grupo organizis esp. kioskon. Paris. En la Foire de Paris (10—25 majo) la direkto abafide disdonigis al „Esperanto kaj Komerc“ grandan elon por ekspozicio, gvidata de f-lino Gerard. La Pariza Komercia Cambio farigis membro-donacinto de „Esperanto kaj Komerc“.

En dua eldono reviziita kaj pliampleksigita prezentiĝas tiu bonega lenolibro de Butler...

La malkara prezo ebligas al ĉiu intereso aĉeti la libron. Preso kaj arango estas tre bonaj...

Rocznik Lubelskiej Spółdzielni Spożywców. Rok 1923 XI. Lublin, Zamojska 10, 15x22.5 cm, 72 pg...

ABC de Sennacismo, de V. Elsdoo, 12x18 cm, 59 pg, broŝo. Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda 1924.

La Protektgardia organizatio. La ĉefiabo de la finlanda civiana armeo antaŭ kelka tempo jam eldonis tiun ĉi verkon ilustritan kaj bele kartonitan...

Esperanto and its Critics, an examination of some idiot objections. 14x22 cm, 11 pg, broŝo. Eldonis BEA, 17, Hart Street, London WC1.

S-o W. E. Collinson, Prof. de germana lingvo kaj hon. lektoro de kompara filologio ĉe la universitato de Liverpool ekzamenas kelkajn idistajn asertojn pri Esperanto...

Esperanto ein moderner Bildungsfaktor. En nia lasta bibliografio en ET 181 ni bedaŭrinde forgesis aldoni, ke tiu tre valora broŝuro aperis ĉe Ellersiek & Borel...

Biologia Esplorado pri Vermo parazitanta en Porko, de Koici, Takegami 15x22 cm 37 pg, broŝo. La broŝuro estas novspeca aplikado de Esperanto en la praktiko medicina...

La broŝuro estas oficiala buleno de la esplora sekcio de la agrikultura ministerio de Formoso. Ĝi pravas ankaŭ kiom alte ekstreman-orientianoj taksas la gravecon de Esperanto...

Esp. Gazetoj.

Pro tre multa kaj grava materialo ne havante lokon en ET ni devas prokrasti ĝis nun la mension de la gazetoj ricevitaj. Pli materialo restas ankoraŭ.

Holandia Esperantisto, Zutphen, n-oj 109-125, kun speciala propaganda-gazeto nova „Werediaal“.

Vöiker-Spiegel, Leipzig-Schönfeld, (Esperanto en la servo de raportado). Valora poresperanta organo por esp. propagando inter laboristoj, limfinda entrepreno.

Der Arbeiter-Esperantist, Leipzig-Neustadt, n-oj 5-5. Esperantio, Berlin-Charlottenburg, ilustrita n-o 5. Depost longa tempo denove aperis numero de tiu ĉi gazeto.

Novaj tempoj, Leipzig-Connewitz, jan.-aprilo. Revuo por popoledukado kun tre leginda enhavo.

La Verda Oriento, Tokio, n-oj 1-4. Respegulas la aktivecon de niaj japanaj amikoj.

La Verda Ombro, Taihoku, nov.-dec.-jan.-febr. raportas pri la movado en Formoso.

La Verda Lumo, Shanghai, oficiala organo de la hina esperantistaro, n-o 1 aŭg.-dec. 1925. Estas esperinde, ke tiu ĉi gazeto pli forte interligos la ekstremorientajn amikojn kun la samideanoj eksterajaj kaj speciale eŭropaj.

La unuigita tuihomaro, Hamburg, nov.-dec. Bollein de l' 2 congr. esp. Ibericos, Bilbao, n-oj 2-4.

Germana Esperantisto, Berlin SW 61, marto-aprilo, kun interesa radio vortaro preskaŭ plene aprobinda.

La Polcisto, Budapest, marto. Sennacieca Revuo, Paris, marto, aprila, majo, kun literatura aldono. Ankaŭ tiu, kiuj neniel simpatias kun la celo de la laboro movado, devas ĝoii pri la modela laboro farata en tiu ĉi organo.

Pola Esperantisto, Warszawa, nov.-dec. Fluganta Skribilo, Issy (Seine), interesa gazeto en esp. senografio Duployé-Flageul, Reaparas post interrompo. Pli bona aŭtografado estas dezirinda.

L'Antinationaliste, Paris XX, marto-aprilo. majo. La Semisto, Sabadell, jan.-februaro.

La Progreso, Praha, n-oj 1-5. The British Esperantist kaj International Language, London, jan.-aprilo. La div. numeroj estas tre interesaj. La duserieco pravas la vivkapablecon de la entrepreno.

Literaturo, London, jan.-marto. Kun leginda enhavo. Marto, Haïda, marto, aprilo.

Katolika Mondo, Graz, marto, aprilo. En aprila numero kritikias la neutralitecon de ET, neniel difektita. Trofervoruloj simple malkomprenis nian tendencojn. Ne ŝate publikan diskuton pri internaj aferoj ni ne faras pluzajn rimarkojn.

L'Esperantista Catala, Barcelona, marto, aprilo. Esperable la sekvanto al Kat. Esp. sukcesos katenadi la fortojn en Katalunujo malgraŭ la malfacila politika situacio.

Internacia Stenografisto, Issy, Seine, aprilo. Aboninda por stenografistoj de ĉiu sistemo.

La Suda Kruco, Melbourne, jan.-febr. Itala Esperanto Revuo, San Vito al Tagliamento, febr.-apr. Depost la marĉa kajero la revuo aperas en moderna artistista aranĝo.

Negocaj informoj.

Al nia hodiaŭa numero estas aldonita propagando-folio de la Frankfurter Societätsdruckeri, Abtlg. Buchverlag, pri la ĵus aperinta Nitri-libro. Ni rekomendas la enhavon al la atento de niaj legantoj. La unika aplikoj de Esperanto per tia grava entrepreno — subinstitucio de unu el la plej gravaj gazetentreprenoj de l' kontinento — devus instigi ĉiun esperantiston aĉeti la libron, neniel konsiderante la poliikan tendencojn de la eldonaĵo.

Ekkonu Italian!

Ilustritaj gvidlibroj: Venecio L. 10, Trentino L. 5.50, Rimini L. 2, Bologna L. 1, Ravenna L. 1, Terni L. 1.

Gramatiko de Itala Lingvo per Esp. L. 15 Vortaro Itala Esperanta (Meazzini) L. 5 Vortaro Esperanta Itala (Meazzini) L. 5 Itala Rakontoj (De Amicis) L. 5 De Apeninoj ĝis Andoj (De Amicis) L. 2.50 Ŝakludado (Ciacosa) L. 5 Cavalleria Rusticana (Verdi) L. 2.50 Pri la devoj de l' homoj (Pellico) L. 3 La pesto en Milano dum 1630 (Manzoni) L. 2 Anekdotoj pri Dante L. 0.50 Vivo de S. Francisco el Assisi (Carolf) L. 5 Tra la Franciskana Urbo Assisi L. 2 Itala Esperanta Revuo (monata) Jarab. L. 10

Eldonejo: A. PAOLET S. Vito al Tagliamento :-: (Italio).

Kio estas S.A.T.

S.A.T. estas organizaĵo celanta meti Esp. je la servo de la proletaro tutmonda

S.A.T. estas poresperanta aparato neniel politika

S.A.T. kvankam utilcela laboristoverso, estas samtempe atideala: ĝi celas krei ĉe siaj membroj sennacian spiritosciton.

Kiajn organojn havas S.A.T. por plenumi tian taskon?

S.A.T. eldonas por plenumi tian taskon monatan revuon, ilustritan kun literatur-scienca aldono:

„Sennacieca Revuo“

(Redakcio: 24 Bould. Beaumarchais, Paris XI; Administraco Colmsr. I, III, Leipzig-Stöt., Germanujo)

S.A.T. eldonas per sia Eldonkooperativo gravajn verkojn el tiuj „Faŭsto“ de Goethe kaj „Eklumo en Abismon“ de H. Barbuse estas jam aperintaj

S.A.T. eldonas Jarlibron, enenanta la adresojn de sia membraro, statistikojn pri la laborista movado en la mondo kaj plej diversajn sciindaĵojn.

Kion jam faris S.A.T.?

S.A.T. okazigis 5 kongresojn, kies lasta estis honore prezidata de la fama scienculo A. Einstein

S.A.T. vekis ĉe la esp. laboristaro grandan intereson, veran entuziasmon kaj per tio certigis la sukceson de Esp. en proletaj rondoj.

S.A.T. estas lege enregistrita en Francujo. Detalojn oni petu skribante al la sidejo. Adreso: Sennacieca Asocio Tutmonda, 25 rue Boyer, Paris XX.

Poŝtmarkoj!

Table with 2 columns: Description of stamps and their prices. Includes items like 'Marienwerder provizoroj 1.- 2.- 5.- 5.-', 'Supersilezio, plebscito, 20 mars 1921 10 f. - 1 Mk. kompl.', etc.

Member of the International Esperantist League. Includes a star logo and contact information for Fr. Jacobi, Bahnhofstrasse 29, Coblenz - Germanujo.

Filatelistoj atentu!

50 diversajn PM uzitajn de Ĉeĥoslovakio, bonkvalitaj, sendifektaj, unungraj po 3 sv. fk., plus 35 diverseksploŝtmarkojn de Ĉeĥoslovakio kun surpriso SO 1920, neuzitaj en valoro de 27 fk. laŭ kat. Yvert 24, nur 8 sv. fk. aŭ egvalvaloru sendas en rekomp. letero filatelic afanklita nur kontraŭ antaŭpago en monbiletoj aŭ novaj PM. Ĉe 10 seroj mi donas 15 proc. rabaton. Senprokrasta plenumo de la mendoj garantiita. Mendo tuj ĉe J. Basil, vicdel. de UEA, St. Ostrava 968 (Ĉeĥos). Ankaŭ interŝanĝas PM kun ekster-eŭropanoj.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, flandiĝo, edziĝo, morto, okazaĵoj gravaj esp. kunvenoj, festoj k.s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akceptataj por minimume du sinekvilaj impresoj, kostas po du impresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezo de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭpago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas por propra anoncetoj preferan prezo de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.- mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

ROZOLEO bulgara unuakvalita, specimena 5 grama botel-ejo sufiĉas por 1 litro da parfumato, kontraŭ 6 germ. mk. Vendita ankaŭ pogrande. Ofertojn ĉe la reprezentanto Ivan H. Krestanoff, Wintergartenstr. 9, Dresdng A 16 [3]

PARDONU longegan prokraston mian. Ofica kaj esperantista laboro malhelpas regulan korespondadon. Je la fino de la jaro mi esperas esti ordiginta mian esperantan laboron. Ĉiuj skribintoj bonvolu pacienciigi. Hendrix Victor, Zalmstraat 43, Geni, Belgujo. [1]

SAMIDEANOJ HELPU! Por sukcesigi esperantan propagandon inter lernantoj de arbara lernejo, ĉiuj helpemaj samideanoj estas petataj sendi malnecesajn por ili apartajn numerojn de esperantaj gazetoj, ĵurnaloj ktp. al Lesnaja Skola, lejejo de lernantoj, Toĵima de Vologda gub., Rusujo. [2]

DANKO. S-o Agourine el Paris dankas s-ojn Maliszewski kaj Capella en Poznan por ilia afabla akcepto kaj gvido iri la urbo. [1]

MI PETAS pardonon de miaj estimataj korespondantoj el ĉiuj landoj, se mi iome prokrastos respondojn al iliaj leteroj, ĉar mi provizore translokiĝis. Post du aŭ tri monatoj revenante hejmen mi respondos. Mia nova adreso: E. F. Rebrik, Barfrouche, Persujo. [2]

VERDAJ STELOJ en bela Ochi-puntaĵo, manlaboro, en silko, kotono, lano, 5 ĝis 10 cm. grandaj, belaj ornamantoj por subteleroj, flagoj ktp. aŭ aliaj ochi-puntaĵoj! Geinteresuloj skribu al f-lino Hildegard Nickel, Potsdam, Blücherplatz 2, Germanujo. [2]

58-JARA FRAŬLO, de kelka tempo senlabora, serĉas ĉian laboron. Preferas okupon kiel magazenisito, kun ĉevaloj kiel fiakristo, kapablas ankaŭ labori en litografio. Parolas germane kaj esperante. Bonvolu skribi al H. Winkler, Tummelplatz 10, Linz, Aŭstrio. [2]

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

Du fratoj Mikaelo Morozov kaj Georgo Morozov, Kandalakŝa de Arĥangelska gub., barak 21b, kv. 2, Nord-Rusujo, por perfektigi en Esperanto-lingvo, deziras korespondi kaj interŝanĝi per PK il. kaj l. pri ĉiu alio temo kun gesamideoj de la tuta mondo. Tuj respondojn. [2]

S-ino Irma Pick, Liechtensteinst. 25, Wien 9 Bez., Aŭstrio, deziras korespondi per il. PK kun ĉiuj landoj. [2]

S-o Semerad B-huslav, instruisto, Chlumoc n. C., Ĉeĥoslovakio, interŝanĝas PM kun ĉiuj landoj. [2]

Atentu! Tri veraj esperantistoj deziras interŝanĝi per il. PK (bfl.) kaj L. nur kun sinceraj gesamideoj. Adresoj: H. Siebenkess, Ludwigstr. 45, R. Ulrich, Guttenbergerstr. 2, K. Waldmann, Längenauestr. 62, ĉiuj en Selb (Bavariujo), Germ. Ni ĉiam respondos al ĉiuj. [2]

Tri latvaj fratuloj deziras korespondi letere aŭ PK kun samideanoj tutmonde, precipe kun fraŭlinoj, pri diversaj temoj. Respondojn ni grantas aimonaŭ unufojan. Kaporalo Indriki Grislis, Kaporalo Andreo Sikis 5. Tukuma b-na en Vec-Gulbene, Latvio. [2]

S-ano Davv Patt, ul. Cegielińska 71, Lodz, Polujo, deziras korespondi serizoj pri tekstaj aferoj precipe interŝanĝas diversaj teks-, b-od- kaj ardesegnaĵojn kaj koncernajn ĵurnalojn. [2]

Kiu sendas al mi 100 aŭ pli PM de sia lando ricevas saman kvanton da germanaj PM Walter Bartels, Braunschweig, Lessingplatz 3, Germanujo. [2]

F-lino Tani Brejchova, Kral Vinohrady, Korumni tr. 54, Ĉeĥosl., deziras korespondi kun la tuta mondo kaj interŝanĝi PM, L. PK kaj diversajn objektojn. [2]

S-o Cari Krüger, poŝtoficejo, Steinf. Friedrich-Karlstr. 17, Germ., deziras interŝanĝi PM kun ĉiuj landoj. Mi povas doni „Deutsches Reich“ (1906-24) kaj Danzig aŭ monon. Ne sendas unue. [2]

S-o Johano Danca, 8 Štřiz str. 9.1.16., Budapest, Hung., deziras korespondadi kun la tuta mondo pri fakorganoj kaj sov.-partio-organoj. Nur tuj skribu, kiuj partoprenas je laborista movado aŭ bone konas ĝin. [2]

Mi deziras korespondadi kun ĉiuj landoj nur per Esperanto. Mi antaŭ nelonge alveturis el Buhara (Turkestano). Volonte sendas vojaĝ-impresojn. Adreso: Rusujo, Sibirio, Altajo, St.-Barda, Bijskago uzezo, por s-o Nury Hazym-Bek. [2]

Mi deziras korespondadi kun fraŭlinoj ĉiulandaj kaj ekster-eŭropaj samideanoj (mi estas 25-jara komercisto). Ĉeĥoslovakio, Deksstas. Eduard Friedmann, Dolna okr. 04, Prešov, Ĉeĥosl. [2]

Mi deziras korespondadi kun fraŭlinoj ĉiulandaj. Z. Rónai, drogistoj, Corso drogerio, Prešov, Ĉeĥosl. [2]

S-o Lavička Ferdo deziras korespondi kaj interŝanĝi il. PK (bfl.) kaj PM. Respondas al ĉiu akurate. Adreso: Daruvar en Jugoslavio. [2]

Karl Mätzl, Hainburg, Aŭstrio, deziras korespondi kun franca samideano, kiu sendas francalingvajn librojn kaj revuojn (kontraŭ pago). [2]